




Boletín

n° 406 Aprilo - Junio 2014



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
Aperanta de 1949
Numero 406

Redakto-skipto

Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos
López

Revizio: Alejandro Pareja

Retadreso de la bulteno:

bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas
nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun
permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. Lasi
mesaĝon en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Félix M. Jiménez

Kasisto: Raúl Mtnez. Anguita

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor

Juan José Vera

Jesús García Cano

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)

DL: M-39811-2012

Salutvortoj

Post mia sperto en Arundo, okaze de nia 73-a Hispana kaj 18-a Andaluzia Kongresoj de Esperanto, mi ne hezitis prezenti specialan bultenon plena je artikoloj kaj raportoj pri la kongresoj: Katalin Kovats el Hungario, Marketa Wilkus el Pollando, nia kara samideano kaj poeta amiko Miguel Fernández kaj mi mem, verkis pri la afero kaj mi esperas ke la ideo plaĉos al vi, ĉar mia intenco estas ke la legantoj, kiuj ne ĉeestis la kongreson, legos raportojn kaj impresojn kaj ĝuos kelkajn fotojn pri la neforgesebla evento. Mi ricevis kelkajn mesaĝojn el nombraj geamikoj, kiuj jam interesiĝas pri la venonta kongreso, kiu, kompreneble ne okazos en Andaluzio, sed mi vigligos ilin, ĉar mi scias ke baldaŭ aperos volontulo por organizi ion similan en alia parto de Hispanio kaj se la urbo ne malproksimas el Malago, mi volonte partoprenos la aranĝon, kiu ne temos pri flamenko, sed temos pri hispanaj kutimoj por altiri eksterlandanojn. Mi rekomendas legi la artikolon de Miguel Fernández pri Vivu la Teatro, ĉar ĝi estas vere interesa kaj majstre verkita por tiuj kiuj deziras malkovri belsonajn vortojn kaj esprimojn. Ankaŭ la artikolo de Katalin Kovats ege valoras la penon ĝian legadon, ĉar ŝi neniam antaŭe vizitis la duoninsulon kaj enamiĝis al la belecoj de Arundo kaj Malago. Ŝi faris bonan laboron, ĉar la ekzamenintoj ankaŭ estis bonaj, kaj ĉiuj sukcesis.

Ĝuu la legadon.

La Redaktoro

Enhavo

Salutvortoj	1
Prezentu vian kandidatecon por venonta kongreso	2
Ordinara Ĝenerala Kunveno	3
Rezolucio de la Hispana Kongreso	4
Pri Grupoj kaj Asocioj	5
Forumo pri lingvoj en Tuluzo	8
Antonio Marco Botella en “El País”	9
Temoj pri HEF	10
Premio en Festivalo al la esperanto filmeto “Espero”	12
Salutmesaĝo de UEA al la Hispana Kongreso de Esperanto	13
Salutmesaĝo de ILEI al la Hispana Kongreso de Esperanto	14
Raporto pri la Hispana kaj Andaluza Kongresoj	15
XXVIII Esperantaj Tagoj de Krakovo	19
Lerni, ekzameniĝi kaj instrui, postkongresa letero de Katalin Kovats	22
Tria okazigo de la spektaklo Vivu la Teatro	25
Memore al Juan Régulo Pérez	29

Ĉefa kovrilo Katalin Kovats

PREZENTU VIAN KANDIDATECON POR VENONTA KONGRESO

La Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio en Arundo debatis kaj aprobis la proponon pri Regularo de Hispanaj Kongresoj de Esperanto, kiu jam troviĝas je la dispono de la membroj de la asocio en la interna spaco de la retejo de HEF, kaj ankaŭ povas esti sendita al la grupoj kaj esperantistoj ĝin petantaj. La Kunveno debatis ankaŭ la diversajn eblecojn por la okazigo de la Kongreso de la jaro 2015, sed ne atingis definitivan decidon. La Estraro de HEF prenos decidon dum la venontaj du monatoj, kaj do grupoj kaj aktivuloj kiuj deziru prezenti sian kandidatecon, ankoraŭ povas tion fari. Sendu viajn proponojn al hef@esperanto.es, kaj profitu la eblecon ĝui unikan eventon en via urbo kaj montri tiun ĉi al la hispaniaj kaj tutmondaj esperantistoj.

ORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La 4-an de majo 2014 je la 10:00 horo (dua alvoko) okazis la Ordinara Ĝenerala Kunveno en la “Palacio de Congresos de Ronda” de Arundo (Malago). Ĉeestis la estraranoj: Eduardo Berdor (voĉdonanto), Félix Manuel Jiménez (Sekretario), Ángel Arquillos (vicprezidanto) kaj Juan A. del Barrio (Prezidanto), kiu prezidis la kunvenon. Partoprenis ankaŭ 24 individuaj anoj (el kies 1 reprezentata) kaj 4 kolektivaj membroj (Frateco, Kantabra E-Asocio, Andaluza E-Unuiĝo, kaj Madrida E-liceo) reprezentataj de kvar el la ĉeestantaj individuaj membroj, entute 32 partoprenantoj. La sesio disvolviĝis laŭ la jena tagordo:

1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (5-a de majo 2013).

Oni aprobis unuanime la protokolon de la antaŭa kunveno.

2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2013.

La kontoj, prezentitaj en la Boletín n-ro 405, estis aprobitaj unuanime.

La Prezidanto komentas pri la kontoj, ke kvankam bonas ĉar ni gajnas monon, certe la asocio devas elspezi pli da mono por plenumi ĝian celon. Ankaŭ parolas pri la ebleco deponi parto de la neuzatan monon en UEA.

3.- Aprobo de la Raporto pri aktivajtoj de 2013.

La raporto, prezentita en la Boletín n-ro 405, estis aprobita unuanime.

4.- Informo pri la anaro:

Aniĝantaj je la dato 31-a de decembro 2013 (maksimume ŝuldas du jarkotizojn):

Individuaj (OM, DM, PM kaj HM): 152 (el kiuj 7 apartenas al la junulara sekcio HEJS)

<u>Kolektivaj:</u>	<u>13</u>
ENTUTE:	165

La Sekretario rimarkas la stabiliĝadon de la numero da anoj dum la lastaj tri jaroj.

5.- Aprobo de la agadlineojn 2014.

La Prezidanto klarigas la agadlineojn proponatajn por la jaro 2014. Post tio, la agadlineoj 2014 estis aprobitaj unuanime.

6.- Aprobo de la Buĝeto por 2014.

La Buĝeto, prezentita en la Boletín n-ro 405, estis aprobita unuanime.

7.- Kotizoj por la jaro 2015.

La kotizoj por 2015 restas same ol tiuj de 2014.

8.- Aprobo de la Regularo por la Hispanaj Kongresoj.

La Prezidanto komentas la unuan malneton de la nova Regularo de HK kaj faras kelkajn rimarkojn. Luis Hernández faras kelkajn sugestojn kaj post fari kelkajn ŝanĝojn oni aprobas la regularon.

9.- Kreado de la ILEI-Faka Sekcio de HEF.

La Prezidanto komentas pri la ebleco krei ILEI-fakan sekcion en HEF. Oni decidis fari ĝin kaj la estrarano Eduardo Berdor estos la kunordiganto.

10.- Sugestoj kaj demandoj.

HEF esploras la aferon por atingi oficialan rekonon de la KER-atestiloj de Esperanto en la hispanaj universitatoj.

Kongresurbo por 2015: ne estas kandidaturboj, do oni atendos unu monaton post la kunveno por decidi la urbon por la HK2015.

La Prezidanto faras specialan alvokon al la lokaj grupoj pri la ekspozicio de paneloj: disponeblas du kolektoj de paneloj sed estas la lokaj anoj, kiuj devas zorgi pri la loka organizo de la ekspozicio, HEF pagas la kostojn de la sendado de la materialoj (tien kaj reen) sed ne havas surlokan kapablan organizon.

Kani sugestas pri la kotizoj, ke iu ano povu pagi la kotizon de alia nepovpaganto kaj HEF komunu al *Ministerio de Hacienda* la tutan pagon de la unua ano, tial la lasta profitos la dekalkuladon el la impoŝtoj.

Ana Manero, respondeculo de Bitoteko, petas sendi al retadreso de la Biblioteko la revuojn de la lokaj grupoj apartenantaj al HEF.

Sen pli da aferoj por pritrakti, finiĝas la kunveno je la 12:00 horo.

La Prezidanto

José Antonio del Barrio Unquera

La Sekretario

Félix Manuel Jiménez Lobo

REZOLUCIO DE LA HISPANA E-KONGRESO:

Konstatinte la ĉiam pli vastiĝantan fendon inter Nordafriko kaj Sudeŭropo, kiu okazigas miskomprenojn kaj antaŭjuĝojn inter la popoloj de ambaŭ flankoj de la Mediteraneo, la ĉeestintoj de la 73a Hispana kaj 18a Andaluzia Kongresoj de Esperanto laboris super la plifortigo de rilatoj inter la homoj de ambaŭ marbordoj.

Tiucele, grava parto de la programo estis dediĉita al la temo: Esperanto en Nordafriko, kaj la organizantoj faciligis la ĉeeston de Nordafrikaj najbaroj.

Rezulte de la Kongresa laboro estiĝis la intenco pli sisteme kaj intense kunlabori por la disvastigo de Esperanto en la nordo de Afriko, kreante la bazan strukturon por organizita movado tie.

La temo de la Kongreso: Esperanto kaj Flamenko reliefigis la ĉiam ekzistantajn historiajn kaj kulturajn ligojn inter la sudo kaj la nordo de Mediteraneo. Arundo mem, gasturbo de la Kongreso iĝis, krom nekomparebla kadro por la disvolvo de la Kongresa programo, danke al ties fama ponto, simbolo de la celo de nia ponto-lingvo: Esperanto.

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio (Arundo)

Post la du lastaj kongresoj, hispana kaj andaluza, kune okazintaj en Arundo (Ronda), la grupoj de ambaŭ urboj (membroj de la LKK), daŭre komentas pri la neforgesebla evento, kiu sukcesis dank'al diversaj gravaj temoj tie traktitaj kaj ankaŭ al elstaraj homoj el Katalunio kaj eŭropaj landoj, kiuj riĉigis la eventon. Ni jam pripensas la aferon por la estonto, sed pormomente ni devas pripensi pri nia regiona kongreso, kiu okazos venontjare. Ni dubas pri tri urboj: Seviljo, Kordovo kaj Jerezo. Pri tio ni parolis la pasintan 7-an de junio en la urbo Arundo, kie ni profitis la okazon elekti vicprezidanton de AEU al nia kara arunda samideanino Fátima Jiménez. Post la agrabla kunsido, ni kuntagmanĝis ĉe konata restoracio, kie ni gustumis bonajn pladojn kaj ni daŭrigis nian babiladon pri la sama temo.

Aragono

Aragono kaj Esperanto.-

"FRATECO" analizas sian laboron dum la lasta jaro.-

Kiel ĉiujare, "Fratego" analizis sian aktivadon dum la jaro 2013 en Asambleo okazinta la duan dimanĉon de februaro 2014: unue la Prezidanto, s-ano Lorenzo Noguero, legis la konto-etatojn de la pasinta jaro: (Bilanco, Spezo-konto kaj memoro), kaj la proponitan buĝeton por 2014, kiujn oni metis je la dispono de iu ajn membro, kiuj dezirus ekzameni ilin. La konto-etatoj estis aprobitaj unuanime de la kunvenantoj.

Poste, la Prezidanto informis al la membraro pri la donaco de multenombraj esperantistaj libroj, laŭ deziro de la forpasinta samideanino Pilarin Zaragoza, kiun ni publike dankas, kies rezulto estis la pligrandigo de la Biblioteko de la Centro, kiu jam atingas aŭ preterpasas 4.000,- ekzemplerojn. Aldone la Prezidanto ankaŭ informis, pri la decido de la estraro oferti malmultekoste, unue al la membroj kaj poste al tiuj esperantistoj kiuj tion deziras, la ripetitajn librojn. Oni decidis fari liston de la vendeblaj libroj por publikigo.

Alia motivo de kontento estis la komenco de Esperanto-kurso, kun kontentiga partopreno, kiun gvidas samideano Pablo Conesa. Verŝajne laŭplaĉe de la lernantaro, ĉar ili fidele ĉeestas ĉiumarde. Ankaŭ la veteranaj geesperantistoj kiuj jam regas la lingvon, kunvenas ĉiumarde kaj sin dediĉas al la legado de historiaj esperantistaj tekstoj, inter ili biografioj de pioniroj, per kiuj oni konas la historion de nia Movado.

Kiel reago al la tagordo pri "Petoj kaj Demandoj", veterana samideano proponis celebri ĉiujare, krom la "Tagon de Zamenhof" jam antaŭ longe funkcianta, la "Tagon de la Poezio" (en kiu ĉiu kunvenanto recitas poemon), kaj la "Tagon de l' Libro", (legante Don Kihoton en Esperanto) kaj tiel reliefigi publike la karakteron kulturalan de nia Asocio.

La kunvenantoj de la Asambleo ankaŭ aprobis "lasi je la decido de la nuna estraro la eventualajn ŝanĝojn de la estraranoj de "Fratego".

Zaragoza, februaro 2014.

Kastilio-Leono (Sorío)

PREZENTADO DE ESPERANTO EN SORIO

Okaze de la Tago de Eŭropo, la sekcio de la Oficiala Lingvo-Lernejo de El Burgo de Osma (provinco Sorío, Kastilio kaj Leono) organizis enkondukan prelegon pri Esperanto plus Bazan Kurson, gviditajn de nia kolego Carlos García. Laŭ la organizantoj mem vekis tre grandan intereson inter ĉiuj ĉeestantoj. Du ekzempleroj de "La Eta Princo", donacitaj de HEF, estis lotumitaj inter la partoprenantoj.

La evento estis raportita la sekvan tagon en la provinca ĵurnalo "El Heraldo de Soria", en novaĵo kiu okupis la plejparton de la lasta paĝo, kun fotoj, kiel oni povas vidi en apuda bildo.

Idiomas para unir pueblos y países

La sección de la Escuela Oficial de Idiomas en El Burgo de Osma celebró ayer, por tercer año consecutivo, el Día de Europa, con un programa abierto a todos para dar a conocer la multiculturalidad de las lenguas.

La jornada comenzó con un quiz sobre las lenguas que permitió que los alumnos del centro que acudieron hasta el aula disfrutaran aprendiendo sobre vocabulario y tradiciones. Después Charlie llevó a cabo una charla en inglés que ayudó a los asistentes a conocer un idioma desde el punto de vista del que habla, del que escucha y de lo que realmente quiere decir, haciendo bromas sobre las malas interpretaciones de las lenguas.

El cierre de la jornada fue la clase impartida por el soriano Carlos García sobre el esperanto. Gracias a sus aportaciones los alumnos se acercaron hasta esta lengua que nació en Bialystok, hoy en Polonia, gracias al objetivo de Ludwik Lejzer Zamenhof que buscaba crear una lengua pacificadora que uniera a las gentes en torno a esta moderna Torre de Babel en la que



Alumnos asistentes a la celebración del Día de Europa durante la clase de esperanto.

Kantabrio

LA PREZIDANTO DE HEF VIZITIS LA KANTABRAN ASOCION

La prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio vizitis Santanderon la 28an de marto, kaj kunvenis kun pluraj membroj de Kantabra Esperanto-Asocio en ties sidejo. Oni parolis pri la nuna situacio de ambaŭ asocioj, kaj pri la perspektivoj de la esperantista movado en Kantabrio, Hispanio kaj la mondo.

Oni ankaŭ pritraktis la eblecon ke Santandero gastigu venontjare la Hispanan Esperanto-Kongreson, afero kiun la kantabria grupo detale studos antaŭ ol preni la decidon prezenti sian kandidatiĝon.



Madrid

PARTOPRENO EN LA TAGO DE LA LIBRO

Madrida Esperanto-Liceo partoprenis la tradician ĉenlegadon de "Donkiĥoto" en la kulturcentro Círculo de Bellas Artes de Madrido. Alex kaj Andy legis po unu fragmenton de la dua Libro, jaŭdon la 24-an de aprilo, vespere.

La legado estis registrita, kaj ĝi spekteblas en la adreso de Jutubo de la Liceo: <http://www.youtube.com/watch?v=0KHHcyP-tyI>.



Manolo, Andy, Alex kaj Toño

La 23-an de aprilo Alejandro Pareja partoprenis la celebradon en Valdemoro, per la legado de peco de la verko Donkiĥoto en la kultura centro Juan Prado.

La dimanĉon 27an de aprilo oni celebris la Tagon de la Libro en la Junulgastejo de San Fermín. La organizantoj invitis al MEL por partopreni en la agado, per la prezentado de la libro "Poezio: armilo ŝargita per futuro" de Miguel Fernández. Miguel prezentis la lingvon internacian kaj la libron, kaj li deklamis kelkajn poemojn, akompanate de Mati Montero, en la hispana kaj en Esperanto.

Ankaŭ tiu ĉi agado estis registrita kaj publikigita en la MEL-kanalo:

<http://www.youtube.com/watch?v=cdHSBcB5Eac>.

Valencio

ESPERANTISTAJ JUNULOJ EN LA EŬROPA PARLAMENTO

Inter la 9-a kaj la 11-a de majo estis organizita en la sidejo de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo renkontiĝo de reprezentantoj de internaciaj asocioj de la Eŭropa Unio, en kiu partoprenis ĉirkaŭ 5.000 junuloj. Ĉeestis ampleksa grupo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), inter kiuj Enric Baltasar, de la Valencia Esperanto-Asocio.



La renkonto, nomita EYE2014, konsistis el granda kvanto da prelegoj, debatoj, koncertoj, distraĵaj kaj alitipaj aktivajoj, ĉefe en la sidejo de la Parlamento sed ankaŭ en la urbo Strasburgo, sub la devizo "Ideoj por pli bona Eŭropo".

La esperantistaj partoprenantoj ĝuis la okazon montri al la ceteraj partoprenantoj kaj al la laborantoj en la Eŭropa Parlamento, ke Esperanto estas lingvo funkcianta kaj ebliganta komunikadon inter junuloj el la tuta kontinento.

FORUMO DE LINGVOJ EN TULUZO

En Tuluzo jam iĝis tradicio la ĉiujaraj "Forom des Langues" (Forumo de Lingvoj) en kiu asocioj el pluraj landoj kaj regionoj prezentas siajn lingvon kaj kulturon en la Kapitol-placo, la ĉefplaco de la urbo. La Esperanto-Kultur-Centro ankaŭ havas je sia dispono senpagan budon por prezenti esperanton al la publiko. Ĉijare ĝi okazis la 18an de majo kaj pli ol 70 lingvoj estis reprezentitaj, inkluzive de la eŭska, la kataluna, la galega kaj la kastilia. La esperanto-skipo deĵoris ekde la 9a matene kiam la stando estis muntita ĝis la 7a vespere kiam la aranĝo finiĝis.

Komence mi estis iom skeptika, eble pro la antaŭjuĝoj kiujn ĝenerale la socio havas pri esperanto, kaj ne atendis tiom da reagoj pozitivaj. Mi, Andy, portis pinglon kun la sciigo "Hablo Español" kaj mi okupiĝis pri informado en la hispana kaj foje en la franca. Multaj hispanoj, latinamerikanoj kaj eĉ du junaj alĝerianoj kiuj iam studis en Hispanio, alproksimiĝis kaj demandis pri nia lingvo. Kutime ni petis, se ni vidis intereson, iliajn datumojn por kontakto kaj ni plenis plurajn foliojn por tio.



Kutime ni respondis al la kutimaj demandoj: Kie oni ĝin parolas? Kiom da parolantoj ĝi havas? Mi profitis la okazon ne nur por prezenti esperanton kaj disdoni informilojn sed ankaŭ por paroli al ili pri la movado en Hispanio kaj ties agado. Pluraj estis vere interesitaj post diskutado pri la nuna diskriminacio ene de Eŭropa Unio rilate al kelkaj lingvoj kaj pri lingvolernado. Ni montris simplan ludeton per kiu ili mem malkovris la gramatikon kaj la logikon de artefarita lingvo kiel esperanto.

Tiaj eventoj kie pluraj asocioj diskonigas kulturon kaj lingvon estas idealaj se oni volas kontakti vid-al-vide kun ili por ontaj kunlaboroj. Dum la aranĝo mi profitis kaj kontaktis la membrojn de Vikimedia Francio kaj ili plezure akceptis partopreni en ateliero kiun mi gvidos en esperanto pri vikipedio en la esperanto-klubo. Alia kontaktado, ne tiom agraba, estis kun la budo de alia planlingvo kaj ties kreinto. La lingvo nomiĝas Uropi, vi povas trovi artikolon pri ĝi en Vikipedio. La lingvokreinto estis sufiĉe malafabla kun kelkaj sciivolaj esperantistoj, ankaŭ kun mi, precipe kiam mi diris ke "esperanto ne havas konkurantojn".

La tago estis vere laciga, en kelkaj momentoj eĉ se ni estis 6 deĵorantoj kun pluraj interesatoj, ni ne kapablis informi al ĉiuj homoj pro la amasa alproksimiĝo kaj demandado. Tiu aranĝo certe povas esti nomata "la evento de la jaro" ĉar ĝi estas ideala okazo por informi pri esperanto al lingvemuloj.

Andy Hernández

ANTONIO MARCO BOTELLA EN "EL PAÍS"

Longa intervjuo al nia veterana samideano Antonio Marco Botella, prezidanto de Fondumo Esperanto, verkisto kaj instruisto de Esperanto, okupis la pasintan 21an de aprilo preskaŭ la lastan paĝon de la ĵurnalo "El País", la plej disvastigata en Hispanio.

En la raporto Antonio parolas pri siaj spertoj dum la ekzilo post la interna milito de Hispanio, kaj plurfoje mencias la rolon de Esperanto, kiu helpis lin en tiuj teruraj tagoj. Oni ankaŭ mencias lian verkojn en Esperanto, kaj speciale liajn "Lirikaj perloj de Al-Andalus", kolekto de poezio el la epoko de islama dominado en la Iberia Duoninsulo.

EL PAÍS

PORTADA

INTERNACIONAL

POL

SOCIEDAD

VIDA & ARTES EDUCACIÓN SALUD CIENCIA MEDIO AMBIENTE IGUALDAD CONSUMO CO

▶ ESTÁ PASANDO Educación Igualdad Alzheimer Privacidad internet Treviño V

ALMUERZO CON... ANTONIO MARCO »

“Para Francia éramos unos bandidos”

■ Este profesor de esperanto estuvo en un campo de refugiados en Argel

KRISTIN SULENG | 21 ABR 2014 - 19:54 CET

4

Archivado en: Refugiados Víctimas guerra Francia Argelia Magreb África Dictadura Conflictos Europa occidental Sociedad Política



"Los jóvenes solo pensábamos en dejar el país", narra en su libro de memorias de juventud Antonio Marco Botella, de 93 años, retirado de la industria textil y antiguo profesor de esperanto. Pero, estraperlo y dictadura fue lo que encontró en la España de 1945 al volver tras seis años como refugiado político en Argelia. Este vecino de Zaragoza, nacido en la población alicantina de Callosa de Segura, es uno de los pocos supervivientes del pasaje del *Stanbrook*, el último carguero que permitió el exilio de cerca 3.000 republicanos hace 75 años.

HEF EN LA FOIRO DE SOCIA EKONOMIO DE MADRIDO

Hispana Esperanto-Federacio, kune kun Madrida Esperanto-Liceo, partoprenis la 2-an Foiron de la Socia Ekonomio de Madrido, kiu disvolviĝis inter la 31-a de majo kaj la 1-a de junio en la Kultura Centro Matadero.



Temas pri evento fariĝinta referenco de la entreprenoj kaj organizaĵoj partoprenantaj la movadon de la Solidara Ekonomio en la ĉefurbo kaj ĉirkaŭaĵoj, kaj esplorantaj novajn formojn de alternativa interrilato. Oni povas legi plu pri la karaktero kaj la celo de la evento, hispanlingve, en la retejo de la Foiro <http://laferiamadrid.mercadosocial.net>.

disponis je diversa materialo por vendi specialpreze. interesiĝantaj pri la lingvo, kun kiuj ni konservas kontakton.


Ni disponis je budo, en kiu ni montris diversan materialon pri la lingvo, disdonis broŝurojn, kaj informis pri Esperanto kaj ĝia movado. Ni ankaŭ instigis aliĝon al kursoj kaj Ni kontaktis kun multaj homoj

HEF EN LA POLA AMBASAĜEJO



Hispana Esperanto-Federacio ricevis inviton de la Pola Ambaŝado en Madrido partopreni la kunmemoron pri nacia festo okaze de la 25-a datreveno de la unuaj balotoj en Pollando.

La prezidanto de HEF partoprenis la akceptadon kaj havis la ŝancon paroli kun diversaj ĉeestantoj pri la lingvo kaj la asocio.



ZAMENHOF EN KALENDARO DE LA POLA INSTITUTO

La kalendaro eldonita de la Pola Kultura Instituto en Madrido, kun bildoj de famaj pollandanoj, dediĉas la monaton marto al D-ro Zamenhof, per afiŝo de la ekspozicio en la Centro Ludwik Zamenhof en Bjalistoko.

DONACADO DE LIBROJ AL KVARTALA BIBLIOTEKO FAR HEF



HEF donacis kelkajn librojn al la Biblioteko de la Kvartalo San Fermín de Madrido. Temas pri popola biblioteko kaj socia projekto, kiu funkcias de antaŭ tridek jaroj por doni al la loĝantoj de la kvartalo la kulturen servon, kiun la madrida Urbeŝtaro neas al ili. Tie okazis dulingva legado de poezio (hispana/esperanto) far Miguel Fernández dum la tago de la libro la pasintan aprilon. La libroj estis Vortaro "Amika", Kurso de E-o de M. Gutiérrez (kun KD), *Don Kihoto parolas e-on* kaj Poezio, armilo ŝarĝita per futuro.

EKSPOZICIO EN NACIA BIBLIOTEKO



Ekspozicio en la Nacia Biblioteko pri la frua turismo komence de la 20-a jarcento, kiu montriĝis en la Nacia Biblioteko inter la 20a de februaro kaj la 18a de majo 2014 kun la titolo "Visite España, la memoria rescatada", enhavis du librojn rilatajn al Esperanto:

- Hispanujo (dispublikigo kaj propagando) / F.J. Sánchez Cantón; (tradukis Hispana Esperanto-Asocio).-Madrid, 1926
- Sevilla / Comité de Iniciativas y Turismo – Sevilla, 1928 (donaco de Hispana Esperanto-Federacio al la Nacia Biblioteko)

PREMIO EN FESTIVALO AL E-FILM(ET)O: “ESPERO?”



E-film(et)o ricevis premion en internacia festivalo pri kino kaj medio (“Ecozine”) okazinta en Zaragozo en majo de 2014.

La titolo de la filmo estas ESPERO? (HOPE?). Kaj (bonŝance!!) eblas spekti (kaj elŝuti) ĝin libere en la reto. Jen la ligilo: <http://vimeo.com/71742636>

La mallonga filmo (je 4 minutoj kaj 21 sekundoj) emas veki konscienciĝon pri la konduto (kaj respondeco) de la homo rilate al la Tero, al la natura medio. Estas simpatia prezentado (en kina lingvaĵo je alloga kvalito en 3D) de la historio de planedo al kiu alvenas la homo kaj ties evoluo.

La filmo (en ties originala versio) estas aŭskultebla en esperanto (danke al laboro farita de Mariana Evlogieva) kaj kun subtekstoj en angla lingvo. Iel, oni povas pensi ke trafe oni elektis la universalan lingvon esperanto por paroli pri unu komuna tero kaj tia infana raso nomata “homo”.

Jen informado pri la direktoro Simone Giampaolo kaj ties filmo(j):

<http://simonegiampaolo.com/>
<http://simonegiampaolo.com/page/2/>

Kaj jen pli pri la filmo:

<https://www.facebook.com/esperohope>

Por mi estis agrabla surprizo kaj mi sugestas aliri al tiu simpla sed pensiga kaj sentinda filmeto.
Lorenzo Noguero

SALUTMESAĜO DE UEA AL LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Karaj kongresanoj,

Nome de la Estraro de UEA, mi gratulas vin, kaj aparte la organizantojn, pro la kunmeto de riĉenhava kaj varia programo por la 73a Hispana Kongreso. Eĉ en epoko de amasa reta komunikado, la fizike ĉeesta kongresado daŭre ludas nemalhaveblan rolon en la disvolviĝo de nia kulturo kaj la firmigo de nia memkompreno kaj sento de komuna direkto kiel movadanoj. Mi ne dubas, ke vi revenos hejmen el la kongreso kun pli gajaj koroj kaj pli da energio por la pacienca kaj sindona "laboro de la esperantoj."

Via decido okazigi samtempe la 1-an Konferencon pri Instruado de Esperanto en Hispanio (kaj la mondo) bonege kongruas kun la nova Strategia Laborplano de UEA kaj ties emfazo pri la graveco de Kapabligo kiel unue el la kvar ĉefaj agadkampoj de la Asocio. Instruado, edukado, klerigado, trejnado - tiuj aktivaj troviĝas kerne de nia misio kiel esperantistoj. La KER-ekzamenoj de UEA, per kiuj esperantistoj povas ricevi oficialan agnoskon de siaj lingvaj kapabloj, estas unu el niaj lastatempaj gravaj atingoj sur tiu kampo. Mi ankaŭ substreku la grandan



potencialon de retaj kursoj, kiel lernu.net, por malfermi vojon al la movado por multaj homoj kiuj ne povas ĉeesti lokan kurson. Kiel vaste parolata internacia lingvo, la hispana ludas gravan peran rolon en la reta instruado de Esperanto, kaj ekzistas multaj ŝancoj kunaktivi sur tiu kampo kiel lingvo-helpanto, tradukanto, kursgvidanto aŭ informaktivulo. Flanke de UEA, ni klopodas krei taŭgajn strukturojn, programojn kaj materialojn kiuj faciligos tiun laboron.

Kiel ebla plia paŝo en tiu direkto, mi invitas vin pripensi la organizadon de Seminario por Aktivula Maturigo (AMO-seminario). La Seminiarioj celas plialtigi la nivelon de niaj bazaj movadaj laboroj, ekde la gvidado de lokaj kluboj kaj la rilatoj kun amaskomunikiloj ĝis la reprezenta laboro ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj la ellaboro de terminaroj pri diversaj fakaj kampoj. Ni estos feliĉaj, se ankaŭ Hispanio viciĝos inter la organizantoj de tiuj seminarioj en la venontaj du-tri jaroj.

Kun scivolo kaj aprezo mi atendas raporton pri viaj diskutoj kaj planoj. Fruktonon kaj ĝojplenan kongreson deziras al vi --
Mark Fettes

Prezidanto

Universala Esperanto-Asocio

SALUTMESAĜO DE ILEI AL LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



Karaj partoprenantoj de la hispana Kongreso

Mi salutas vin kaj gratulas vin, ke vi venis por partopreni tiun gravan eventon, kiu okazas nun en Ronda - Malaga; ĝi restos en viaj memoroj.

Tiu evento ebligas al la partoprenantoj revidi geamikojn el Hispanio, konatiĝi kun novaj personoj, vigligi rilatojn inter vi. Tiu evento ebligas al la partoprenantoj sperti internacian etoson, konatiĝi kun esperantistoj el najbaraj landoj kaj el foraj landoj, salti trans la limoj kaj forgesi la limojn. Tiaj saltoj estas tre tre valoraj. Tiaj saltoj malfermas la okulojn kaj la korojn al aliaj homoj, aliaj kutimoj. Estas por mi ĉiam granda ĝojo, kiam mi povas partopreni en internaciaj kunvenoj, kiel mi faris en januaro kadre de la kvina Afrika Kongreso de Esperanto en Kotonuo, Benino.

Vi metis frontpaĝe la instruadon de Esperanto. Tio aparte ĝojigas min. Kompreneble mi tre ĝojus, se la instruistoj kaj subtenantoj de la Eo-instruado en via lando sukcesus krei sekcion en la sino de ILEI. Rigardu la informojn en www.ilei.info kaj tenu min informita. Mi estas je via dispono. Dum nia 47a Konferenco en Montevideo en julio ni voĉdonos por la akcepto de nova sekcio en Irano kaj en Kongo RDC. Espereble en Hispanio ankaŭ!!! Estus bela sukceso!!!

Mi tre dankas nian kolegon Sinjoron Berdor, kiu tradukis al la hispana nian varbilon. Nun niaj kolegoj en Montevideo printis ĝin kaj ĝi estos uzata en Urugvajo dum nia Konferenco kaj en Argentino okaze de UK.

Jen konklude mi deziras al vi fruktodonajn kunvenojn, interesajn prelegojn, sukcesajn ekzamenojn, agrablan tempon, belajn tagojn, bongustajn manĝojn, kaj tiel plu!!
Ĝuu kongresan etoson !!

Vivu kaj kresku Esperanto en via lando kaj en la tuta mondo !

elkore salutas el Svislando Mirejo Grosjean

prez de ILEI

RAPORTO PRI LA 73-A HISPANA KAJ 18-A ANDALUZIA KONGRESOJ DE ESPERANTO EN ARUNDO DE LA 1-A ĜIS LA 4-A DE MAJO 2014

Mi legis kelkajn artikolojn rilate al niaj lastaj 73-a Hispana kaj 18-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, okazintaj en Arundo (Ronda) de la 1-a ĝis la 4-a de majo, kaj mi dankegas la aŭtorojn, ĉar unu el la du verkis por Vikipedio kaj la alia verkis por la bone konata Eŭropa Bulteno. Mi agnoskas ilian laboron kaj mi sincere dankegas al ambaŭ, kaj tiamaniere mi profitas la okazon verki raporton por *Boletín*, ĉar mi konas sufiĉe bone preskaŭ ĉiujn detalojn de la komenco ĝis la fino kaj la postkongreson, kiu okazis en Malago kaj Mijas. Do mi kuraĝos raporti pri la grava evento:

Iom post iom, devenantaj el pluraj urboj de Hispanio, Eŭropo, Ameriko kaj Nord-Afriko, proksimume 150 homoj

interkonatiĝis kun la "Revata urbo Arundo" kaj kun la ideo ĉeesti kaj partopreni nacian kongreson, ĉi foje, nacian kaj regionan, ĉar tiel ĝi estis aranĝita kaj prezentita. Ekde la unua momento ĉiuj ricevis bonegan impreson pri la arta urbo, plena je monumentoj kaj ĉirkaŭita de impona kaj senfina montaro, kiu antaŭlonge iĝis fama pro la t.n. "banditoj", kiuj rabis la



riĉulojn por helpi malriĉulojn aŭ por supervivado, ĉar tiuj homoj fuĝis en la montaron pro diversaj punindaj aferoj kaj iamaniere pentis kaj volis solvi siajn problemojn per tiu drasta maniero.



La programo disvolviĝis senprobleme kaj ĉiumatene la kongresanoj ricevis folion enhavantan la programeron por elekti la plej interesan prelegon, okazantaj en la du salonoj.

La 1-an de majo je la 11,30 h. okazis nesolena malfermo de la kongresoj kun la celo konatiĝi kun la alvenintaj kongresanoj kaj tuj poste, grupo de homoj ĝuis interesan promenadon tra la urbo.

Pli poste, je la 16-a h. Miguel Hernández prezentis sian libron pri tradukitaj poemoj *Poezio, armilo ŝargita per futuro* kun prelego titolita "Esperantigitaj voĉoj de andaluzaj poetoj". Samtempe kaj ĉiutage okazis paralele, Laborkunsidoj kaj Kursoj de Esperanto, gvidataj de Rafael Mateos.

Je la 17-a h. Rafaela Urueña, prezentis sian libron *Eŭropo paŝon post paŝo* kun prelego pri Internacia Juro.

Tuj sekve, Eduardo Berdor prelegis pri "La franca lingvo en Nord-Afriko"

Je la 18,40 h. nia franca samideano Thierry Saladin prelegis pri "Projekto TUJ, Esperanto Komun Lingvo por la Eŭropa Unio".

Kaj por fermi la unuan tagon kaj honori la moton de la kongresoj "Flamenko kaj Esperanto" en la t.n. Peña Flamenca, (Flamenka Rondo), ni ĝuis la neforgeseblan spektaklon "Flamenka Vespero" kun kantistoj kiel: Paco Pereña, Miguel Laín, Ríos Cabrillana, Antonio Sanlúcar kaj El Mollina, akompanataj de la gitaristoj: Agustín de la Fuente kaj Miguel Laín. Dancistino Virginia Pereña "La Chabuca" kaj man-plaŭdisto: Paco Pereña "Junior". Kompreneble ne mankis bongusta biero kaj vino je modesta prezo. Tio okazis la unuan tagon kaj la duan, kiam jam estis alvenintaj ĉiuj kongresanoj, ni komencis la tagon per Laborkunsido pri Bitoteko, endonado de libro, instruado de Esperanto k.t.p.

Je la 10-a h. okazis la Solena Malfermo kun ĉeesto de aŭtoritatuloj kaj koncerto de Kvaropo Sinkopo, kiu impresis nin per belaj kantoj. Tuj poste, ĉe la bela korto de la Kongresejo, preskaŭ ĉiuj partoprenis la komunan foton.



Koncertis ĉe la korto de la Kongresejo la maroka muzik-grupo Al-Ándalus

Je la 11,30 h. mi prezentis la verkon *Mediterraneaj eroj II* kun apogo de Miguel Fernández kaj José María Rodríguez. Mi profitis la okazon prezenti denove mian unuan volumon *Mediterraneaj eroj* kaj la hispanan sonetaron *Al son de mis sonetos*. Miguel kaj mi deklamis kelkajn poemojn kaj en la hispana kaj en esperanto.

Viktoro Solé, elstara kataluna esperantisto de la grupo KEA prelegis pri "Mansignado por Esperanto" (helpilo por la lernado/instruado de Esperanto).

Francisco Javier Moleón prelegis pri "Lingvoj en Afriko" kaj tuj poste Enric Baltasar, prelegis pri "Esperanto kaj socio: pruvitaj ideoj funkciantaj". Samtempe ĉe la urba Teatro kelkaj homoj prov-ludis la spektaklon *Vivu la Teatro*, kaj en alia salono oni prelegis al la grupo de pli ol 30 studentaj gejunuloj, neesperantistoj, kiuj ĉeestis la duan tagon kun la celo informiĝi pri Esperanto.

Je la 16-a h. "Kiam la Sudo rigardas Norden" estis la titolo de la prelego gvidata de Rikardo Albert, kaj dume en alia salono José María Salguero prelegis pri "Vikipedio".

Tiun vespero disvolviĝis la ĉefa evento de unu el la aktoj nome, la pritraktado de la movado en la Nordo de Afriko Dorota Parzyszek, poldevena loĝanta en Tunizio, parolis pri la nun disvolviĝanta movado en tiu ĉi lando, kaj la juna marokano Mounir Abjiou pritraktis la movadon en sia lando. Bedaŭrinde pro burokrataj problemoj ne povis venis esperantistoj el Alĝerio. La diskuto vekis grandan intereson kaj oni pritraktis la eblecojn helpi la movadon en en tiu lando-parto tiel ligita al Andaluzio. Pri tiu klopodo temis grandparte la rezoluzio de la kongreso, kiun oni povas legi en alia paĝo de tiu ĉi bulteno.

Alia grava akso de la kongreso estis la tempo de instruado, kaj ni grupigis ĉiujn aktivajn pri tiu kampo ene de tiel nomata "Unua konferenco pri instruado de Esperanto en Hispanio kaj en la mondo". Unu el la ĉefaj eroj de tiu Konferenco okazis tiun saman vesperon per la prelego de Katalin Kovats, ĉefrespondeculo de edukado.net kaj de la KER-ekzamenoj de Esperanto, pri la temo "Oficiala instruado de Esperanto"

Post la variaj prelegoj, ĉi foje en la korto de la Kongresejo, la muzik-grupo el Maroko, Turat Al-Ándalus, ofertis agrablan melodian koncerton.



Kaj por amantoj de muziko, la esperantisto Pablo Carrascal koncertis en la trinkejo Drink&Co.

La 3-an komenciĝis per ekskurso al Setenil de las Bodegas, belega proksima vilaĝo kaj Acinipo (antikva Arundo) kie nur restas parto de la romia teatrejo. Ambaŭ lokoj impresis la partoprenantojn, kiuj ĝuis neforgeseblan matenon.

Je la 14-a h. okazis komuna tagmanĝo en la Flamenka Rondo, kie denove kelkaj kantistoj spontane amuzigis la etoson per flamenkaj kantoj.

Pli poste, je la 16,30 h. ni alvenis piede en la kongresejon por partopreni laborkunsidon pri kreado de videoj, gvidata de Miguel Gutiérrez Adúriz. Aliaj elektis la prelegon de Félix Jiménez pri Sociala Ekonomio kaj ĝia rilato kun sociaj movadoj.

Je la 17-a h. okazis la Ronda Tablo pri Instruado de Esperanto kaj finfine, je la 18,30 h. en la urba teatrejo komencis la spektaklon *Vivu la Teatro III* kun partopreno de nombraj geesperantistoj, gvidata de Miguel Fernández kaj Ana Manero. Menciĵoj la partoprenantojn estos tre longa afero, tamen oni havas la eblecon spekti la filmetojn rilate al la spektaklo en la reto, kiuj estis senditaj de Miguel G. Adúriz: <https://www.youtube.com/watch?v=fOBkKcbJUA>. Klakante ĉi adreson vi trovos ĉiujn videojn pri ĉiuj aktivajoj de la kongresoj.

De la 9-a h. ĝis la 18-a proksimume, okazis la KER Ekzamenoj, niveloj B1, B2, C1, kun 15 ekzamenoj.

Kaj la apoteozo konsistis en speciala kaj luksa koncerto de la fama arunda kantaŭtorino María Villalón (venkinto de “Faktoro X” 2007), kiu kantis kaj en la hispana kaj en esperanto sur la scenejo de la Flamenka Rondo. Noktomeze komenciĝis la festo de Esperanto kun la fama kantisto JoMo, kiu vigligis la etoson kaj dancigis amason da homoj dum preskaŭ du horoj.

La 4-an tagon, kiel kutimas en ĉiuj hispanaj kongresoj, okazis la Ĝenerala Kunsido de HEF kaj paralele en la korto, Raúl Salinas el Valencio, gvidis kurseton pri Salso por komencantoj. Ni profitis eĉ la lastan minuton antaŭ ol la Solena Fermo de la Kongreso, kiu okazis je la 13-a h. kun ĉeesto de multaj kongresanoj.

La postkongreso okazis en Malago. Deko da homoj, ĉefe eksterlandanoj, vizitis la urbon Malago gvidataj de Carlo Spinola, Mariló Torres kaj mi. Malgraŭ varmeĝo ni profitis la okazon viziti interesajn lokojn: Urbodomon, Ĝardenojn, Alkazabon, Havenon, trinkejon Esperanto, ktp.



La duan postkongresan tagon ni veturis al la urbo Mijas, fama pro azeno-taksioj kaj blankaj dometoj kaj belegaj vidindaĵoj, ĉar la urbe-to staras ĉe monto.

Mi ne memoras similan kongreson en Hispanio, tio signifas ke ĝi sukcesis kaj nun ni devas prilabori por aranĝi alian similan aŭ pli gravan.

Ángel Arquillos

XXVIII ESPERANTAJ TAGOJ DE KRAKOVO

(30.05 – 1.06.2014)

„Memorante pri la 650-a datreveno de Jagelona Universitato en Krakovo”

Kaj kiel Arundo dum la 73a Hispana kaj 18a Andaluzia Kongresoj aperis en la programero de Esperanto Tagoj de Krakovo

Dum tri belaj tagoj ne nur krakovanaj esperantistoj renkontiĝis por prezenti riĉan kulturprogramon de la Esperanto klubo en Krakovo kaj de la invititaj gastoj de aliaj polaj urboj. Venis ankaŭ kelkaj eksterlandanoj el la najbara Ĉeĥio.

Ankaŭ mi estas ĉeĥino, sed eble jam ne tiom eksterlanda, ĉar mi vivas kaj laboras en bela Krakovo kaj decidis kontribui al la programo portante la varman kaj amikecan etoson pri la belega Arunda Esperanto Kongreso, kien mi vojaĝis komence de majo ĉi jare. Mian prelegon mi decidis ornamati per deklamado de poezio de la malaga poeto kaj Prezidanto de Andaluzia Unuiĝo Ángel Arquillos López. Tre grandan sukceson rikoltis ankaŭ la kanto *Pluvo* de arundana kantistino Maria Villalón.

La programo estis varia kaj mi diru kolora. Unu el la ĉefaj temoj estis dediĉitaj al Jagelona Universitato. Ĝi estis fondita en la jaro 1364 de la reĝo Kazimiro la 3a Granda kaj estis la dua universitato en la meza parto de Eŭropo - post tiu de Prago. De la komenco ĝi inspiriĝis pri la strukturoj de la universitato en Bolonjo edukante en la liberaj artoj, medicino kaj juro. Inter la famaj gestudentoj de la universitato por nomi nur kelkaj estis Nikolao Koperniko – granda astronomo, ekonomiisto kaj filozofo de renesanco, Wisława Szymborska – Nobelpremiita grava poetino, Johano Paŭlo la 2-a – papo, Krzysztof Zanussi – filma reĝisoro. La partoprenantoj de Esperantaj tagoj de Krakovo vizitis la Muzeon de Jagelona Universitato ĉe Collegium Maius.

Mi venis sabate posttagmeze al Kultura doma Podgorze, kio estas kvartalo de Krakovo nomata Kazimierz kie vivis plej multe da galiciaj judoj kun riĉegaj tradicioj kaj vivo nun por ĉiam perditata.



Kaj la unua prelego en kiun mi saltis estis pri diversaj aspektoj de koloroj.

Andrzej Kolpanowicz estas fama pola esperantisto kaj pentristo de metafora superreala arto konata ne nur enlande. Li prezentis al ni kiajn kolorajn efektojn oni povas obteni dank' al diversaj kolorkombinaĵoj kaj ni vere admiris kion oni povas krei dank' al la alĥemiaj reakcioj de diversaj kolorotipoj, kiuj aŭ kunharmonias aŭ entute male. Do, oni devas bone scii, kiujn kolorojn kune miksi kaj kies miksaĵon eviti.

Liaj du gefiloj Julia kaj Joachim Kolpanowicz faris belan kontribuon koncertan, ludante pianon kaj violonon.

Tomasz Chmielik, pola esperantisto, tradukisto kaj instruisto. Fondinto de la eldonejo Libro-Mondo, en kiu ĝis nun li aperigis dekojn da libroj, ĉefe siajn beletrajn tradukojn el diversaj lingvoj - informis pri la gravaj eldonoj de Esperanto literaturo, interalie pri la libro de Walter Zelazny kun titolo *Lazaro Zamenhof: Lia pensaro, sekvoj kaj konsideroj*.

Sinjoron Tomasz Chmielik akompanis Lidia Ligeza, filologino, poetino. Ili ambaŭ instruas Esperanton en altlernejaj kursoj kaj internaciaj feriadoj kaj lekcias pri la Esperanta literaturo en la universitato Adam Mickiewicz (Poznano).

Tuj poste nian programeron prikolorigis juna energio de Tobiasz Kubisiowski, kiu prelegis pri la kontaktoj inter la junaj geesperantistoj. Unu el liaj grandaj meritoj estas fondaĵo de la junula esperanto movado en nia urbo nomatan *Krakovanoj*. Pli da informoj pri la nova junulara esperanto aktivado oni povas trovi ĉe: <http://krakovanoj.pl>

Same kiel dum la Hispana kaj Andaluza kongreso oni povis spekti aŭtentajn muzikstilojn kio estis flamenko kaj tradiciaj mezepokaj andaluz-arabaj kantoj dum nia aranĝo. Irena Urbańska pola kaj samtempe famkonata eksterlande kantistino de klezmera muziko prezentis aŭtentikajn kantojn de Mordejaj Gebirtig, la muzikarto kiu eliras el la koroj kaj tuŝas la korojn de la aŭskultantoj.

Mordejaj Gebirtig talento denaska, bardo de jidlingvaj kantoj naskiĝis en la jaro 1877 en Krakovo en malriĉa juda familio. Profesie li laboris kiel lignaĵisto kaj nokte apud naftolampo en Kazimierz li komponadis, memkantadis kaj verkadis. Li estis ankaŭ aktiva ĉe Juda teatro, kie li kiel aktoro brilege prezentis diversajn teatraĵojn al la popola publiko. Interesa fakto estas, ke iam Polando estis la sola lando, kie oni produktis filmojn en la jida lingvo. En unu en liaj versoj li ĝisrevidas kun Krakovo antaŭvidante sian morton. Li pereis kiel pli ol 400 000 judoj dum la murdoperacio "Rheinhard" dum la jaro 1942, kiu signifis definitivan finon de galicia juda loĝantaro.



Dimanĉe nia renkontiĝo daŭrigis en Ŝinoda-Kuracejo Centro de orienta medicino en la kvartalo Nova Huta. D-ro Ideo Shinoda estis fondinto de Universala Medicina Esperanto Asocio. Nia preleganto d-ro Włodzimierz Opoka estas la nova ĉefradaktoro de Medicina Internacia Revuo, kiu daŭrigas sian laboron prezentante al ni la 101-an eldonon de tiu ĉi internacia medicina ĵurnalo. Tio ĉi estas unika kaj verŝajne ununura revuo, kiu akceptas artikolojn en diversaj lingvoj kun deviga resumo en la angla kaj esperanta lingvoj. La jaro 2014 estas speciale grava por UMEA, ĉar en julio inter la 16a kaj 20a UMEA organizos en Budapeŝto la 19an Internacian Esperanto Kongreson sub honora protekto de la redaktoro de la Semmelweis Universitato en Budapeŝto, prof. d-ro Agon Szel, kaj la redaktoro de la Medicina Kolegio de Jagelona Universitato en Krakovo, prof. d-ro Piotr Laidner.

Programo estis ankaŭ dediĉita al interesa temo pri la *Subĉielaj Migrantoj*, prelegis Adam Wilkus, ŝatanto de naturo kaj ornitologio.

Se mi povus resumi la aranĝon, mi ne volas nur blinde laŭdi ĉion, mia voĉo estas ankaŭ kritike-ma, sed tio gravas por la venonta plibonigo de la organizado kaj eble propagado ne nur al la lokaj klubanoj, sed ĉefe al la ekstera publiko, ĉar nur tiel per tiu ekstera informado nia lingvo havas ŝancon vivi plurajn dekadajn. Kion mi ege bedaŭris estas la komuna foto kun ĉiuj partoprenantoj do eĉ tiu ĉi manko estas iu stimulo por pripensi fari tion pli bone venontfoje.

Krakovo estas belega urbo same kiel mezepoka Arundo kaj mi kore invitas vin viziti nian Malgrandpolandan regionon, la fluglinioj estas nun tre oftaj kaj jam ne tro kostaj, flugoj estas rektaj el Malago, do mi varme invitas vin ĉiujn veni ĉi tien al nia bela romantika Krakovo kaj sperti esperantan etoson ĉi tie kaj ne nur.

Redaktis:

Markéta Wilkus

Fotis: Andrzej Sochacki kaj Markéta Wilkus



LERNI, EKZAMENIĜI KAJ INSTRUI

Postkongresa letero de Katalin Kováts

Korajn salutojn al ĉiuj geamikoj en Hispanio, ĉu partoprenintoj de la Hispana-Andaluzia Kongreso, ĉu forestintaj.

En ĉi tiu malfermita letero mi skribas pri kelkaj el miaj pensoj kaj sentoj, dumkongresaj kaj postkongresaj, sed unuavice mi deziras gratuli la organizintojn kaj ĉiujn kontribuintojn pro ilia laboro. Duavice mi dankas vin pro viaj tutkora gastigado kaj prizorgado. La tuta evento restos pozitiva memoraĵo en mia koro.

La kongreso estos speciala – diradis Juan. Kaj li pravus.

Kiam mi ekvidis la belegajn fotojn en la reto pri Ronda (kaj mi tuj aldonu, ke en mia gepatra lingvo la hungara, la vorto *ronda* signifas *malbelega*) mi iom timis, ke la tuta evento fariĝos turisma ekskurso kaj ne kongreso kun prelegoj kaj diskutoj, kaj certe ne kun seriozaj ekzamenoj por kio mi celis partopreni.

Ĉu en admirinda loko, plena sunbrilo kaj blua ĉielo oni vere laboros, ekzameniĝos? – estis miaj duboj. Ili montriĝis tutvanaj, kaj la organizintoj per siaj proponoj, kaj la kongresanoj trovis tre sanan ekvilibron inter serioza laboro, informado al la ekstera mondo, turismumado, renkontiĝoj de diversaj kulturoj kaj kulturaj amuziĝoj, eĉ gastronomiaj aventuroj.

Kvankam mi mistrafis la unuajn du tagojn, tamen mi sukcesis ĝui la andaluzan koncerton en la palaca korto, prezenton kaj kunmanĝadon kun la membroj de la Flamenka Rondo, koncerton de via ŝatata kantistino María Villalón kaj tiun de JoMo (kompreneble same ŝatata), promenadon en la urbeto kaj kunmanĝadojn.

Mi bedaŭras, ke mi mistrafis la publikan lecionon por la mezlernejanoj. Estas bone, ke vi planis tiun programeron, ja lastatempe pluraj landaj kongresoj provas aranĝi tiajn informprogramojn, sed ili ofte ne havas tiom da partoprenantoj. Pro la ekzamenado mi vidis nur la duan parton de la altnivela teatra programo, kaj nun tre ĝojas, ke pere de la publikigitaj filmoj en la reto mi povas ĝui multajn el la eroj, mistrafitaj aŭ jam spektitaj. Gratulojn pro tiu grava arkiva laboro.

Vi certe scias, ke mi multe vojaĝas, partoprenas jare en dekoj da aranĝoj kun taskoj, kiuj postulas specialajn teknikajojn kaj cirkonstancojn. Tiujn antaŭprepari estas ĉiam tre grave por mi. Jen punkto, pri kiu mi havis interesajn spertojn en Hispanio. La peto okazigi ekzamensesion venis



frue, miaj proponoj pri la organizaj taskoj estis akceptitaj, tamen ĝis la lasta tago mankis sufiĉaj informoj kaj aliĝoj. “Venos, venos, vi vidos. Hispanoj decidis pri aferoj lastminute” - skribis pluraj el la organizantoj. Mi decidis fidi ilin, kaj baldaŭ spertis, ke pri vojaĝdetaloj, pri elekto de salonoj, restoracioj, programoj, instalado de retkonektoj kaj pri aliĝoj la decidoj venadas lastmomente en Hispanio, flekse, tamen fine ĉio solviĝas bone. La spontaneco estas grava trajto en tiu lando, mi devas iom lerni el tio.

Mia partopreno fokusiĝis je du gravaj programeroj; la KER-ekzamenoj kaj la prelego pri la nuntempa situacio de Esperanto-instruado. Estante la redaktoro de la porinstruista retejo www.edukado.net mi havas la bonŝancon disponi pri datumoj de instruantoj, kursoj, edukcelaj eventoj tra la tuta mondo. Edukado.net disponigas ne nur instrumaterialojn kaj pedagogiajn artikolojn, sed ankaŭ ebligas internaciaskalan kunlaboron kaj spertintersanĝojn, eĉ funkcias tie reta koresponda trejnkurso pri instruado de Esperanto.

Mia prelego pri la *Nuntempa situacio de Esperanto-instruado* allogis multajn el la kongresanoj. Dankon pro la interesiĝo. Mi atentigis la ĉeestantojn pri la graveco de registrado de Esperanto-kursoj en la reta KURSEJO <http://edukado.net/kursejo>, por ke okaze de pletoj por enkonduko de Esperanto en lernejoj eblu argumenti kaj konvinki la aŭtoritatojn kun datumoj kaj konkretaj ekzemploj. Retrorigarde malfeliĉigas nin, ke kompare kun la plurdek mil lernantoj de Esperanto de la 60-aj jaroj, nun ni havas multe malpli da lernantoj, sed el inter ili nur malgranda nombro de kursoj estas registritaj en la oficiala kurso-listo de edukado.net (ILEI kaj UEA.)

Tiu nombro en Hispanio estis entute unu lerneja kurso kaj 4 movadaj kursoj. ☺

El la konkludoj de kelkaj pasintaj projektoj kaj eksperimentoj klaras, ke en nia agado pri disvastigo de la lingvo, necesas plurfronte kaj paralele agadi. Informado pri la lingvo, varbado, lanĉo de kursoj estas efemeraj rezultoj se ne estas malantaŭ ili seriozaj planoj, programoj, instrupakaĵoj kaj ĉefe trejnita instruistoj. La ŝtataj instancoj konsentos trakti Esperanton kiel “normalan” lingvon, eblan studobjekton en lernejoj nur se nia movado eliras el la amatoreco, kaj kapablas prezenti profesie kompilitajn programojn kaj lernilojn, povas liveri fakulojn. Por tiujn krei kaj uzi, necesas havi grupon de trejnita instruistoj, diplomita en ŝtate agnoskataj lernejoj. Nuntempe la unusola eblo estas en Poznan, Pollando, kie disvolviĝas programo de interlingvistikaj studoj kun studbranĉo de metodologio. <http://edukado.net/poznan> En septembro 2014 startos nova grupo.



El Hispanio nun 2-3 personoj planas aliĝi al la studoj, do, neprus trovi por ili enlande financon helpon. La programo postulas ne nur trijaran studadon, sed ankaŭ vojaĝojn, seriozan laboron, investojn de tempo kaj financaj rimedoj, kiuj ne povas esti ŝarĝo nur por la partoprenontaj individuoj, sed devus esti subteno kaj kontribuo de landaj asocioj, organizaĵoj, kiuj stipendias la studontojn kaj tiel pere de kontraktoj garantias por si mem fakan traktadon de la estonteco de Esperanto.

Al la ofta demando de ekstermovaduloj pri la supozata nombro de esperantistoj en la mondo, mi ofte respondi antaŭe, ke ni ne scias ekzakte, kiel oni ne vere povas scii kiom da vegetaranoj estas en la mondo.

Lastatempe sangiĝis mia respondo; mi simple diras, kiom da esperantistoj trapasis jam la KER-ekzamenojn, rekonatajn fare de ALTE (Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo) kaj kompilitan laŭ la principoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro. Niaj klopodoj altigi Esperanton lingvopolitike je la nivelo de Eŭropo, eniri la asocion, kie akreditigis siajn ekzamenojn Goethe Instituto, Oksfordo, Kembriĝo, Alliance Française kaj ankaŭ Instituto Cervantes, estas fiero por ni.

La sistemo funkcias jam pli ol 5 jarojn kaj ĝis la unua de majo sukcese trapasis ilin 1282 personoj el 61 landoj, kiuj posedas nun atestilon, eldonitan de ITK, ŝtate agonoskata lingvo-centro en Hungario.

En majo trapasis ekzamenojn mondscale pliaj 230 personoj, inter ili 13 hispanoj ĝuste en Ronda dum la kongreso. Se ni supozas, ke ĉiuj sukcesis, hispanoj ĝis nun havis entute 39 ekzamenokazojn, sed ĉar kelkaj aparte trapasis la parolajn kaj skribajn partojn, estas 33 diplomitaj personoj en Hispanio. Preskaŭ la duono de ili havas la atestilon je C1 nivelo, el ambaŭ partoj.

Kion signifas tio mondscale, vi povas vidi la komparojn en la statistika paĝo: <http://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko>.

Kaj en nia nova paĝo, kie troviĝas la listo de tiuj PRI KIUJ NI FIERAS eblas legi la nomojn de la sukcesintoj: <http://edukado.net/ekzamenoj/kandidatoj>.

Vi do marŝas sur la bona vojo. Iom pli da administrado, iom pli da kunagado kaj strategiaj planoj certe portus vin eĉ al pli bonaj rezultoj. Edukado.net havas 163 membrojn el Hispanio. Tio signifas, ke tiom da personoj interesiĝas pri instruado, memlernado, pluperfektigo. Ili estas via kapitalo. Subteno de tiuj, kiuj pretas profesiigi pri esperantologio en Poznan, estus por vi bonega investo, riĉiĝo de la landa movado.

La KER-diplomitoj estas viaj deputatoj por Eŭropo kaj la dumkongrese ekkonitaj junuloj, aktivaj, lertaj kaj agemaj, estas via futuro. Belaj perspektivoj.

Mi do deziras multe da sukceso en viaj agadkampoj kaj dankas ĉiujn, kiuj helpis min dum tiu ĉi kongreso. Mi precipe dankas al Juan Diego Díaz Bautista, Carlos Spinola, Juan Carlos Cuevas Albadalejo kaj Viktor Sole pro la helpoj dum la ekzamenoj, al Carlos Spinola kaj al lia familio pro la gastigado, al Ángel Arquillos kaj al lia edzino Mariló pro la turisma ekskurso en Málaga.

Mi kore kaj nostalgie rememoras tiun belan kongreson en Ronda.

Ĝis la revido vive aŭ virtuale en Esperantujo.

Katalin Kováts,
redaktanto@edukado.net



TRIA OKAZIGO DE LA SPEKTAKLO *VIVU LA TEATRO!*

Kadre de la kongresoj 73a de HEF kaj 18a de AEU, kiuj sukcese disvolviĝis de la 1a ĝis la 4a de la pasinta majo, havis lokon la 3a okazigo de *Vivu la teatro!*. Kiel sciate, ĝi konsistas en propono pri spektaklo horizontala, kolektiva, konceptita por la partopreno de ĉiuj kongresanoj, kiuj deziras publike praktiki ajnan el la teatraj arto-formoj. Ĉar mi pensas, ke arto estu por ĉiuj. Ke ne necesas esti iu Laurence Olivier, iu Nuria Espert, iu Pavarotti por ĝui sursceneje kaj igi la aliajn ĝui dignajn prezentadojn. Nu, surbaze de la artaj preferoj de la teatremuloj, kiuj min –aŭ kiujn mi– kontaktas, mi ellaboras tekston, kiu kunligas ĉiujn ludojn kaj servas al Ana Manero kaj al mi mem por prezenti ĉiun el ili.

Unu fojon plian mi plenas de ĝojo kiel kunordiganto de la spektaklo, kiu ĉi-okaze disvolviĝis en la granda kaj bela teatro *Vicente Espinel*, de Arundo. Multaj el niaj gekompanoj surprizis nin jen per sia nesuspektita talento, jen per plipolurita ekspluato de sia aliookaze jam manifestita artisteco. Partoprenis entute dudek tri kongresanoj, kiuj forrabis al ni la koron deklame, kante, gitarlude, monologe, grandaktore kaj skeĉe en unuopa, duopa aŭ triopa prezentado... Kaj eĉ teknikiste. Dankegon al vi, amiko Xavi Alcalde! Via improvizita transpreno de la teknikista tasko efikis savtabule. Fonis muziko de i.a. J. S. Bach, Mozart, Chopin, Raĥmaninov, B. B. King, Louis Armstrong, Erik Satie...



Ĉi-kuntekste ni faris diversajn omaĝojn:

La spektaklo ekis per lego de la una alineo de *Cent jaroj da soleco*, de la kolombia Nobel-premiito pri literaturo Gabriel García Márquez, verŝajne la plej bona romano en la hispana lingvo post la cervanta *Donkiĥoto*, en traduko de Fernando de Diego. García Márquez mortis antaŭ ne-longe, la pasintan 17an de aprilo, en Meksik-urbo. Kaj ni volis starti honorante lian figuron.

Super la tuta spektaklo ŝvebis la ĉeftemo de la du kongresoj: flamenko kaj esperanto. Mi mem prezentis al la spektantoj la tipojn de flamenko proprajn al Arundo, Malago kaj Granado, nome al Orienta Andaluzio, kaj ilustris miajn klarigojn per diversaj kantoj, bedaŭrinde sen la esenca akompano de gitaro, ĉar ne eblis al la LKK trovi taŭgan gitariston.



Ni priomaĝis la eminentan esperantiston Juan Régulo Pérez en la centa datreveno de lia naskiĝo. Sub la marko Stafeto, tiu universala kanariano aperigis en dudek kvin jaroj preskaŭ cent profesie kompostitajn librojn de grandaj aŭtoroj kaj de verkistoj de li malkovritaj, kiuj riveligis unuarangaj. Liamemore, Toño del Barrio, la HEF-prezidanto, deklamis mian poemon *Al vi, Don Juan, kiu, laŭdire, mortis*, el la kolekto *El miaj sonoraj soloj*, dum fonis muziko de J. S. Bach.

Omaĝon per flamenka kanto ni faris al iu aparte grava andaluza esperantisto, Blas Infante, nomumita “Patro de la Andaluza Patrujo” kaj murdita de la faŝistoj en 1939 pro tio, ke li pledis por la rajto de Andaluzio ekzisti “per si mem, por Hispanio kaj por la homaro”. En la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento, la majstro Pepe Menese popularigis iun granade flamenkan kanton kun jena teksto, kiun mi mem kantis ĉi-okaze:

*Kriis hom' agonianta:
“Vivu Andaluzio libera!”
Kriis hom' agonianta.
Lin la Histori' honoris.
Li nomiĝis Blas Infante.
La memor' pri li benatu.*

Same la tango ricevis nian omaĝon surbaze de tio, ke baldaŭ Bonaero rolos kiel grava urbo de Esperantujo. Kiel multaj el vi scias, ĝuste tie okazos la 99a Universala Kongreso de Esperanto, de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto. La poemo *Tange*, el la kolekto *En la profundo*, de Jorge Camacho, kungluita kun fragmento de samnoma rakonto miapluma aperinta en la n-ro 13a de *Beletra Almanako*, konsistigis la omaĝan tekston, kiun Ana Manero kaj mi deklamis laŭtakte de la senmorta tango *La cumparsita*.

Kompreneble, ankaŭ pri libro ni rigardis inda kaj enda festi centjaran jubileon. La 25an de decembro 1914 aperis la unua eldono de *Platero y yo*, nome *Platero kaj mi*, kiu fariĝis emblemo de la prozpoezio en la hispana lingvo. Ĝia aŭtoro, alia andaluzo, la Nobel-premiito pri literaturo Juan Ramón Jiménez, kies influo sur la hispanan poezion enormas. Ni esperantistoj tiel bonŝancas, ke ni disponas flege prilaboritan esperantigon fare de membro de la Ibera Skolo, Liven Dek, kadre de la kolekto *Hispana Literaturo*. Rosa López deklamis fragmenton el ĝi, nomatan *La aŭtuno*, akompanate de ŝopena preludo.

Post ĉiu ero kaj ĉe la fino, la fervoraj aplaŭdoj de la publiko evidentigis ties ŝaton. Kaj la belaj gratulvortoj poste ricevitaj karesis nian koron kaj instigis nin pluiru tiuvoje. La hungara lingvistino Katalin Kóvats manifestis sin kaptita de la alta arta nivelo kaj de la, laŭ ŝi, senkomparaj pasio, varmkoreco kaj vibroj ŝprucintaj el ĉiuj artistoj sur la scenejo kaj bedaŭris, ke ŝia tasko kiel zorganto pri la KER-ekzamenoj permesis al ŝi traĝui nur parton de la spektaklo. Aliflanke, kuntekste de raporto pri la kongreso, Viktoro Solé, kiu partoprenis en nia afero kiel recitanto, asertas jenen sur la retpaĝo de KEA (Kataluna Esperanto-Asocio):

“Sendube la plej sukcesa programero estis *Vivu la teatro!*, profesie gvidita de Miguel Fernández kaj Ana Manero en la impona urba teatro, kie dudeko da kongresanoj altnivele kantis, deklamis poemojn kaj aktoris en amuzaj skeĉoj, el kiuj elstaris la monologoj de Miguel Gutiérrez Adúriz kaj Manuel Pancorbo, la flamenkaj kantoj de Miguel Fernández kaj la partopreno de Abel Montagut, kiu aktorece deklamis siajn tradukojn de poemoj el *La taurofelu* (‘La pell de brau’) fare de Salvador Espriu”.

Mi deziras kapti ĉi okazon por elkore kaj entuziasme danki kaj gratuli ĉiujn partoprenintojn pro ties bona laboro kaj pro tio, ke ili ankoraŭfoje pruvis, ke ni, simplaj art-amantoj, kapablas fari dignan opan verkon. Ke ĉiu el ili konsistigis unu eron diferencon disde la alia, unu teatran personon, sen antaŭvidita konekso kun la ceteraj, sed ke, unu post la alia, ili ĉiuj kunkonstruis tuton. Unu verkon. Unu teatraĵon. Nian kolektivon spektaklon. La grandan feston de nia kongresanaro.

Apartan dankon mi deziras esprimi al mia amikino kaj ĉiama sursceneja partnerino Ana Manero, kiu, kiel kutime, kvazaŭ per magia bastoneto, tuŝis nian animon per siaj velura voĉo kaj senartifike eleganta teniĝo. Ana estas vera lukso por nia afero.

Permesu al mi fini per tosto. Per la tosto, kiu konsistigis la lastan eron de nia prezentado. Kelkaj ĉeestantoj petis min publikigi la prian tekston. Por tion efektiviĝi neniu publikajo pli oportuna ol *Boletín*:

Ĉe la fino de la spektaklo, Ana Manero kaj mi petis ĉiujn artistojn surscenejen por ke ili kunaj ricevu la aplaŭdojn de la publiko. Tie staris surtable boteloj da andaluza vino kaj glasoj. Laŭ la taktoj de *Libiamo ne' lieti calici*, el *La traviata*, de Verdi, ni enverŝis vinon en la glasojn kaj poste kunludis jenan toston, kiun mi verkis pasintjare por unu el la aranĝoj de la madrida IRO, surbaze de tradiciaj studentaj formuladoj:

TOSTO

KORIFEO:	Ĉu jam ni ĉiuj staras?
ĤORO:	Jes, jam ni ĉiuj staras.
KORIFEO:	Por amuziĝi kunaj
ĤORO:	ni ĉion eblan faras.
KORIFEO:	Sed antaŭ ĉio, karaj,
ĤORO:	trinkadon ni preparas.
KORIFEO:	Kiu soifas?
ĤORO:	Mi!
KORIFEO:	Ĉu vi manĝemas?
ĤORO:	Malpli!

KORIFEO: Ni manĝu en la fino
Ho, jam de kiel longe
ni, ve, ne trinkas...

ĤORO: akvon!
KORIFEO: Do kaptu ni la ŝancon
kaj nun ni litaniu.
Ĥe via flanko mutu ja neniuj.
Priatentu, pekuloj, la nuancojn:
La drinkanto...
ĤORO: ebriiĝas.
KORIFEO: La ebria...
ĤORO: endormiĝas.
KORIFEO: La endorma...
ĤORO: ne pekas.
KORIFEO: La senpeka...
ĤORO: iras en la ĉielon.
KORIFEO: Por ĉiel-iro, frato,
ĤIUJ: do trinku ni ĝis sato.

KORIFEO: Ĝu-dona Kristo-sango,
jam tiel longe fora de la lango,
vi estas la konsolo
sakrala de l' popolo.
Neniam do kabeos ni pri vi!
Vi estas nia di'!,
idol' de ĉi forum'
per omnia sæcula sæculorum.

ĤIUJ : Amen!

KORIFEO: Engorĝen!
ĤORO: Enfaŭken!

KORIFEO: Vivu la arunda kongreso kaj vivu la teatro!
ĤORO: Vivu!

Kaj ni kuntrinkis. Kaj tiel finiĝis la 3a okazigo de *Vivu la teatro!*, multajn el kies eroj vi povas spekti en la Jutuba HEF-kanalo [www.youtube.com/user/esesperanto], dank' al mirinda laboro far Liven Dek.

Miguel Fernández

MEMORE AL JUAN RÉGULO PÉREZ

(Ĉi artikolon la aŭtoro verkis por aperigo en *Boletín kaj Beletra Almanako*)

En 1991, HEF (Hispana Esperanto-Federacio) okazigis sian 51an kongreson en La Laguna (Kanariaj Insuloj). Oni havis kiel ĉefan celon priomaĝi profesoron Juan Régulo Pérez, kiu tiutempe, trafite de grava malsano, sidis senmova sur rulseĝo. La internacia dimensio de lia figuro, lia profesnivela laboro kiel eldonisto de plej unuarangaj E-verkoj sub la marko Stafeto (preskaŭ cent libroj en dudek kvin jaroj), lia alta staturo kiel engaĝiĝinta intelektulo, lia ekzempla sindonemo al esperanto kaj al ties literaturo estis cirkonstancoj tiel apartaj, ke agi laŭ ties postuloj devigis la organizantojn de la omaĝo al trea penado.

Miaflanke, mi jam antaŭe havis enkaŭpe la ideon starigi programon dediĉitan al festado de poezio en ties plej diversaj formoj, kadre de la HEF-kongresoj. Kaj tiu okazo aperis konvena kiel ringo al fingro por ke la de tiam nomataj Lirikaĵoj de HEF premieru. Mi alvokis la internacian kolegaron al partopreno en tiu poezia parto de la omaĝo al prof. Régulo. Respondis Edwin de Kock, Verloren van Themaat, Giorgio Silfer, Boris Kolker, Marko Petroviĉ, Carmel Mallia, Gabriel Mora i Arana, Abel Montagut, Gonçalo Neves, Jorge Camacho (tiutempe Georgo Kamaĉo) kaj Antonio Marco Botella. La festo realiĝis en tri sinsekvaj tagoj. En la du unuaj, ĉefe tri homoj, Ana Manero, Pedro Garrote kaj mi mem, deklamis la tekstojn senditajn de tiuj aŭtoroj, dum fonis muziko de i.a. Musorgskij, Rimskij-Korsakov kaj R. Strauss. La reago de la publiko estis vere kor-karesa kaj varma. En la tria tago, *La profil' de viaj spuroj*, spektaklo, kie muziko, granda ĥoro, solistoj, gitaristino, deklamantoj, lum- kaj son-efektoj aperis, en harmoniaj kuneco kaj sinsekvo, kiel poezia tuto. La entuziasma akcepto far la publiko pruvis al ni, ke ni bone elektis la manieron priomaĝi la majstron Régulo kaj ke poezio, se digne prezentata, plue kapablas ravi la spiriton de la homoj.

Du jarojn poste, la teksto de *La profil' de viaj spuroj*, aŭtorita de mi mem, konsistigis la unuan parton de mia *Am-poemaro*. Per ĝi mi kontribuis al la kvaropa poemkolekto *Ibere libere*, kiu markis la ŝprucon de tio, kion oni poste nomis Ibera Skolo. Pedro Vilarroig, la aŭtoro de la muziko, ĉi tiun evoluigis al kantato, la unua pri neesperanta temo en la historio de Esperantujo, premierinta en 1993 kadre de la 78a UK en Valencio.

Sed prof. Régulo, konata kiel Don Juan en Kanariaj Insuloj, ne povis ĉeesti iun ajn el ĉi tiuj montraroj de niaj respekto kaj admiro al li. La kara majstro sidis kvazaŭ katenita al sia rulseĝo. Muta. Kun plena kompreno de sia situacio, sed nekapabla moviĝi aŭ artikulacii sonojn. Terure!

Post la solena inaŭguro de la kongreso, gvidite de amiko de la profesoro, triopo konsistigita de Antonio Alonso Núñez, tiama HEF-prezidanto, Antonio Marco Botella, tiama *Boletín*-redaktoro, kaj mi mem, iniciatinto de la Unua Lirika Festo de HEF, vizitis la priomaĝaton en ties hejmo. La edzino petis nin paroli al li nur esperante, ĉar, ŝiaaserte, tio ja faris al li bonon. Plej volonte ni plenumis ŝian peton. Kaj evidentiĝis, ke ŝi pravas. Don Juan mienis ĝoje. Jam ĉe niaj unuaj esperantaj vortoj lia

vizaĝo aperis prilumita. Ni rakontis al li pri la naturo de la omaĝo. Pri la omaĝantoj. Pri la kvantoj da amo kaj admiro al lia persono kaj al lia verkaro, kiujn ĉiuj manifestis. Pri la tiamaj sekvoj de lia pionira, altfluga kaj senlaca semado en preskaŭa izoleco: nova generacio de hispanaj E-verkistoj, kiuj komencis brili propralume en la firmamento de la E-beleto... Kaj profesoro Régulo eklarmis. Ankaŭ ni ne povis reteni niajn larmojn.

Ni brakumis lin kaj adiaŭis. Neniam mi forgesos lian tiaman bildon, lian noblan frunton, la imponan dignon de tiu granda homo skurĝata de kruela malsano.

La 27an de januaro 1993, Juan Régulo Pérez mortis. *Boletín*, la organo de HEF, dediĉis al li sian ekstran numeron 310. Ĝin malfervis mia poemo *Al vi, Don Juan, kiu, laŭdire, mortis*, kiu poste, en 1996, aperis kiel konsistiga parto de mia poemaro *El miaj sonoraj soloj*. Nun, kiam ni festas la cent-jaran jubileon pri la naskiĝo de tiu eminenta esperantisto kaj neforgesinda engaĝiĝinta intelektulo, kiu suferis la barbaraĵojn de la faŝisma Franco'a diktaturo, mi sentas lin viva inter miaj tiamaj versoj. Tial mi volas kontribui per ili al honorigo de lia figuro ĉi-kuntekste³.

AL VI, DON JUAN, KIU, LAŬDIRE, MORTIS⁴

Al Juan Régulo Pérez

Ne elegioj, sed vivkantoj rolu.
Dementas draste l' vento, ke vi mortis.
El ombro viavejna, revo-suko,
afrikaj prarajdantoj,
eŭropaj lumjarcentoj,
songoj pri just' kaj tempoj de ĉerizoj
transverŝas sin ventsinen, viv-genere.
Ilin ni sensas en la briz'. Vi foje
eksidas el kuŝad' kaj nin observas.

*Mortintoj sole donas
ĉifonojn el vakuo.
Nur dizertintoj el homeco mortas.*

¹ Gonçalo Neves, Georgo Kamaĉo, Liven Dek kaj Miguel Fernández, *Ibere libere*, Pro Esperanto, Vieno, 1993, 136 p.

² Miguel Fernández, *El miaj sonoraj soloj*, IEM, Vieno, 1996, 100 p.

³ Apenaŭ mi finis verki ĉi artikolon, mi legis en unu el niaj retforumoj mesaĝon de mia amiko Jorge Camacho, kies gravan enhavon mi absolute apogas. Jen ĝi:

Plej bona maniero omaĝi Juan Régulo estas ke oni [nome E-kluboj (por sia biblioteko) kaj individuoj (ĉu

Nin hantas bildoj el paseo ĵusa,
kiam, laudire, vi ankoraŭ vivis.
Tiu somer' de laŭdoj kaj poemoj
al vi. Plej koraj. Plej fervoraj. Niaj.
Rulseĝo, via korp' duoninerta
–karcer' de via menso plej lucida–
kaj via frunto, via nobla frunto,
emerĝa el angoro, tribunusa.
Tiu somer' de via dolor-vintro
fariĝis ĵus printempo,
senfina kaj insula,
de avokadoj, mangoj, papajberoj,
elvokoj kaj ĉeestoj.
Kaj kelkaj tion, tamen, morto nomas!

*Bestio de doloro,
kruela sklaviganto,
vi faras el la vivo plejan morton.*

Ho, ne kolumbari', sed kolombejo!
Ne mutro frosta, sed batad' flugila.

Ne velka flor', sed frukto de morgaŭo,
rezulto de bel-am' revolucia,
kontesta *feto* de futur' beletra
tutmonda kaj eterna:

via verko:
miloj da sorĉaj presej-birdoj, ĥoro
da verdaj voĉoj: onto kaj rakontoj
kaj versoj kaj promesoj,
trans kiuj via puls' falenas ade,
kaj vi montriĝas plu kaj vin postvivas.

por si mem, ĉu por donaci al konatoj, ekzemple eksterlandaj]] aĉetu lian plenan esearon kaj artikolaron Rikolto (Rikolto. Juan Régulo Pérez. [Eseoj / Lingvistiko](#). Fonto. Chapecó. 1992. 596 paĝoj. Prezo: 38.40). Klarigo: la vivoverko de la granda eldonisto kiel aŭtoro: cento da eseoj esperantismaj, filozofiaj kaj filologiaj plus trideko da recenzoj. Legu pli ĉe [<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=4234>].

⁴ Ĉi poemon deklamis pasintmaje la HEF-prezidanto, Toño del Barrio, kadre de omaĝo al prof. Régulo realigita ene de la 3a okazigo de la kolektiva spektaklo *Vivu la teatro!*, kiu havis lokon en Arundo (Ronda) kuntekste de la 73a HEF-Kongreso kaj 18a AEU-Kongreso.

*Senmortas la semantoj
de vero kaj de belo.
Nur ilin ne rustigas la lun-flavo.*

Muslina nokto kveras superkape:
hesperidinaj koploj,
sonoroj atlantikaj
–tropikaj, varmaj–, sibloj
de palmoj, knaroj bananujaj, svagaj
susuroj tamarindaj, kan-arioj:
la spur' de viaj spiroj, dum vi dormas.
El via firmamento miriade
bril-astroj soras, frondas, palpebrumas,
kaj ni ricevas ope
ilian scintiladon kaj konstruas,
ho majstro, kamarad'!, vorto-post-vorte
eskalon el kristal' en la aŭronon.




*Mortintoj sole donas
ĉifonojn el vakuo.
Nur dizertintoj el homeco mortas.*

Miguel Fernández



Aŭditorio Universitato de La Laguna



22-a Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo, 43840 Salou (Tarragona) de la 4-a ĝis la 11-a de oktobro 2014, HOTEL BEST CAP SALOU *** Cala de la Font, 1